

Premio Maŭro La Torre

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj - ILEI

kunlabore kun la **Familio La Torre**

anoncas konkurson pri esplor-laboro en unu el la kampoj, en kiuj laboris la karmemora prezidanto de ILEI, Profesoro **Mauro La Torre** (1946-2010).

En 2011 la Komitato de ILEI elektis Profesoron Mauro La Torre Honoran Membron.

Tiu detala priskribo kompletigas la dokumenton, unuan anoncon, de 2014-08-16

La esplor-kampoj estas:

- Aplikoj de lingvoteknologio al Esperanto kun rezultaj vortaroj aŭ pli ĝeneralaj lingvosciencaj pritraktoj
- Interkultura edukado per Esperanto
- Instruado de Esperanto kaj iloj por instrui Esperanton
- Perfektigaj kursoj por instruantoj de Esperanto
- Retaj kursoj pri Esperanto
- Evoluo de la vortrezoro de Esperanto tratempe kaj nuntempe

Anonco pri partopreno

La kandidato anoncu sian intencon partopreni kaj sian temon ĝis la unua de Januaro 2015 per kontakto kun ilei.prezidanto@gmail.com.

Tiu anonco estu dokumento proks. unupaĝa kun mencio pri la esplor-kampo elektita (vidu supre), prezento pri la preciza temo (200 ĝis 300 vortoj). Tiu dokumento entenu mallongan prezenton de la kandidato / kandidatino (nomoj, loĝlokoj antaŭaj kaj nuna, aĝo, retadreso), de liaj/ŝiaj antaŭaj studoj kaj esploroj, kaj aktivecoj en ligo kun Esperanto.

Reago de ILEI sekvos ĝis la 15° de Januaro.

Esplor-laboro

La esplor-laboro devas esti dokumentita kaj priskribita en prezento de almenaŭ 20 A4-paĝoj, maksimume 30 paĝoj.

Aspekto de ambaŭ dokumentoj

La litertipo estas libera, ĝi estu ne tro ekzota. La margenoj estu normalaj, mezaj. La interlinia spaco estu 1,5.

Mireille Grosjean
Prezidanto de ILEI
Les Brenets 2014-11-01